



*Estrara Komunikado
EKO 2018-23 sendita
el Budapeŝto, la
13an de novembro.*

*Al: Landaj kaj
Fakaj Asocioj de
UEA (aliĝintaj kaj
ne). Plie al la*

Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alirokondicoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

Lvivu la stel'

Kiel tradicie en la plimulto de niaj naciaj kongresoj, komuna kantado ludis grandan rolon ankaŭ en la Kongreso de UkrEA, la landa asocio de UEA en Ukrainio. Grava atingo de tiu kongreso, okazinta en Lviv inter la 19a kaj 21a de oktobro 2018, estis la akcepto flanke de la urba konsilantaro pri la starigo de memortabulo al Vasil Eroŝenko en la strato, kiu portas lian nomon. Pri tio ni raportis en EKO 22.

La kongresa malfermo okazis en impona baroka palaco (vidu la foton), nuntempe la Domo de Sciencistoj. Bonvenigis la kongresanojn la vicurbestro, s-ro s-ro Andrij Moskalento. Sekvis tri prelegoj: 'La kulturoj nacia kaj Esperantaj: vojoj al la dialogo' de Volodymyr Paĉurko, delegito de UEA pri literaturo, kaj de d-ro Jevhen Naĥlik: 'La rolo de Leontij kaj Orest Kuzma en la popularigo de la verkoj de Ivan Franko.' La tria prezentaĵo temis pri la neordinara vivo kaj verkoj de Vasil Eroŝenko.

La ĉefa labora parto de la sekvotaga programo estis la 52a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO). Tio konsistis el FLAM-analizo pri la ukraina movado – per grupdiskutoj la partoprenantoj determinis la fortojn, lamaĵojn de la movado mem, plie de la eksteraj faktoro pozitivaj kaj negativaj. En la tria kongresa tago, la seminarianoj proponis signifan liston de solvoj al la trovitaj malfortaĵoj. La rezultoj estas legeblaj en la sekvaj du paĝoj de la PDF.



Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikadoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>.

FLAM-analizo 7 en Lviv kune kun solvproponoj

Loko: Lviv, sud-okcidenta Ukrainio.

Datoj: La 20a kaj la 21a de oktobro 2018

Kunteksto: La FLAM-analizo okupis la plimulton de la enhavo de la Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) numero 52, kiu mem okazis kadre de la 24a Kongreso de Ukrainia Esperanto-Asocio (UkrEA)

Partoprenantoj: 15 personoj – sekve la diskutoj okazis en unu grupo kun tuja surtabula protokolo.

Temo: "Movada Fortigo en Sud-Orienta Europo". Praktike la traktado rilatis al Ukrainio.

Aldonaĵoj al la FLAM-analizo mem. Stefan MacGill skizis la historion de la kvarjaraĝa AMO-programo kaj klarigis la principojn de la FLAM-analizo. Oleks Hriŝenko klarigis metodon lerni lingvojn kaj aplikadon de teknologio al informado kaj instruado. D-rino Nina Danylyuk prezentis la eblojn de universitata agado kaj la kontribuon de la ILEI-sekcio en Ukrainio (ULEI).

Fortoj

Temas pri la fortoj kaj pozitivaĵoj de la ukrainia Esperanto-movado:

- Longa historio
- Spertaj movdanoj
- Reto de E-klubo
- Eldonada historio – i.a. literaturaĵoj
- Vortaroj kaj lerniloj haveblaj
- Establita membraro kaj asocioj
- Rolo de kantoj kaj muziko
- Translimaj kontaktoj
- Prezento de Esperanto al la publiko
- Universitata kaj scienca agado, i.a. interlingvistiko
- Bonaj rilatoj kun instancoj.



Lamaĵoj

Temas pri la malfortoj kaj negitivaĵoj de la ukrainia Esperanto-movado:

- Limigita kono pri Esperanto inter junuloj.
- Generacia malekvilibro en la membraro.
- Forte limigitaj financaj rimedoj.
- Neracia kaj sendetala planado.
- Nesufiĉe intensa kaj konkreta informado.
- Malmultaj kluboj kaj membroj por lando de 46 milionoj.
- Malfacilo doni efikajn motivojn lerni kaj uzi la lingvon.
- Malgranda nombro de lernejoj, kiuj proponas Esperanton.
- Malsufiĉa atento al la ebloj ekkoni Esperanton per la reto.

Avantaĵoj

Temas pri la fortoj kaj pozitivaĵoj de Esperanto mem aŭ la ukrania realeco.

- Relative rapide lernebla ĝis uzebla nivelo.
- Ebloj por senperaj kontaktoj en eksterlando.

- Fakaj kontaktoj starigeblaj translimen.
- Aliro al vasta gamo de E-materialoj rete.
- Lernefikiga rezulto ĉe la lernado de pliaj lingvoj.
- Lingvo-lernado kaj uzado kiel vivlongigiloj.
- Vastigo de horizontoj pri la ĉirkaŭa mondo kaj popoloj.

Minacoj

Temas pri la malfortoj kaj negativaĵoj de la ukrainia kaj monda realecoj:

- Tendenco en politikaj rondoj defendi unuavice la propran landon.
- Antaŭjuĝoj vaste kredataj pri Esperanto.
- Superrego de la angla por internaciaj kontaktoj kaj privata prosperigo.
- La malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj de Ukrainio.
- Malfacileco trovi favorajn sintenojn ĉe superaj instancoj kaj politikistoj.

Solvoj

- Okazigu la unuan ukrainian KER-ekzamenan sesion (ekzemple en junio 2019)
- Starigu komisionon pri atesto de instrukapablo.
- Esploru la programon RITE de <edukado.net> (reta trejnado pri instrukapabloj)
- Evoluigudistancajn kursojn; pli bone koni jam ekzistantajn.
- Konigu la avantaĝojn de Esperanto, precipe por junuloj.
- Prezentu Esperanton kiel vivantan lingvon kun aktiva parolkomunumo.
- Ekspluatu ĝemelajn urbojn kaj asociojn por sociaj organizoj.
- Okazigu seminariojn pri teknologio, informado, edukado, turismo...

Indas post ses monatoj kaj refoje post unu jaro organizi plian FLAM-kunsidon por pritaksi la gradon de plenumo de la solvoj. Pro la grandaj distancoj en Ukrainio, la fizikaj sesioj nepre havu perretan eblon por diskutado tra iu difinita periodo (tri semajnojn?) antaŭ kaj post la fizika kunsido.



Aliaj FLAM-analizoj

Tiuj estas troveblaj ĉe: www.aktivulo.net / Pliaj projektoj / FLAM